

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

### Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

### Kunlaborantoj

#### de la aktuala numero:

Probal Dasgupta

Emmanuel Desbrières

István Ertl

Mireille Grosjean

Ilona Koutny

Stefan MacGill

Luigia Oberrauch Madella

Radojica Petrović

Harald Schmitz

Bernhard Schwaiger

Margaretha Symoens

Mihai Trifoi



## ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN) .....	3
Ilona KOUTNY: <i>Prof. István Szerdahelyi (1924-1987) [fragmento de artikolo]</i> .....	4
István ERTL: <i>Komence estis la tondilo</i> .....	8
Margaretha SYMOENS: <i>Edward Symoens (1915-1995)</i> .....	9
Luigia OBERRAUCH MADELLA: <i>Mauro La Torre (1946-2010)</i> .....	10
Stefan MACGILL: <i>Stefan MacGill (1948 -) - Prezidanto de ILEI [...]</i> .....	12
Bernhard SCHWAIGER: <i>Ĉiuj Anglujen</i> .....	14
<i>Kritiko de la brita klerig-kulturo</i> (M. GROSJEAN, R. TAGORE, P. DASGUPTA) .....	19
Emmanuel DESBRIÈRES: <i>Vojaĝo al Slovenio danke al Esperanto</i> .....	21
Leterkesto (Mihai TRIFOI) .....	23
Harald SCHMITZ: <i>Trukoj por paroligi la progresintojn</i> .....	24
La simpozioj de ILEI; Kongresoj de ILEI en venontaj jaroj (R. PETROVIĆ) .....	26
La 52-a Kongreso de ILEI (loĝmendilo, transporto) (Radojica PETROVIĆ) .....	30
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj .....	36

## ESTRARO DE LA LIGO

**Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <[mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com)>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Kunordiganto de la estrara laboro. Eksteraj rilatoj (UNESKO, FIPLV kaj aliaj). Informado pri la Ligo. Observanto de ILEI en la estraro de UEA kaj Komitatano A ĉe UEA. Eldonado de la du revuoj de ILEI.

**Vicprezidanto:** Ivan COLLING, DEPAC/UFPR, Ed. Dom Pedro I, Rua Gal. Carneiro, 560, Primeiro. Andar, Centro, BR-80060-150, Curitiba, PR, Brazilo. <[iecolling@yahoo.com.br](mailto:iecolling@yahoo.com.br)>. Eldonado de la Manlibro pri Instruado de Esperanto

**Sekretario:** Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <[lena\\_espero@mail.ru](mailto:lena_espero@mail.ru)>.

**Estrarano pri financaj aferoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, 4 Edgecomb Ct Portland ME 04013, Usono. <[ilei.kasisto@gmail.com](mailto:ilei.kasisto@gmail.com)>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

**Vic-prizorganto de financaj aferoj:** Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, Tel. poŝ.: (+374) 055-27-99-06. <[karinko\\_arm@mail.ru](mailto:karinko_arm@mail.ru)>

**Estrarano pri Kongresoj:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <[radojica.petrovic.rs@gmail.com](mailto:radojica.petrovic.rs@gmail.com)>.

**Estrarano:** JUNG Yuro „Unika”, 101, Bonuru-Musashi, Asahicyou-3, Kawagoe, Saitama JP-350112, Japanio. Tel. poŝ.: (+81) 70-5569-6771. <[yurjun@st.amu.edu.pl](mailto:yurjun@st.amu.edu.pl)>. Reta komunikado, asistanto en kongresaj aferoj, TEJO.

## Scienca Komitato

**Prezidanto: Humphrey Tonkin,**  
Usono, University of Hartford;  
AdE<sup>1</sup>

### Membroj:

**Duncan Charters,** Usono, Principia  
College, Elsah

**Renato Corsetti,** Britio/Italio,  
Università degli Studi di Roma  
„La Sapienza”; AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta,** Barato, emerita  
profesoro de LRU, Indian  
Statistical Institute, Kolkata; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius,** Litovio,  
Šiaulių universitetas

**Boris Kolker,** Usono; AdE<sup>1</sup>

**Iłona Koutny,** Pollando/ Hungario,  
Uniwersytet im. Adama  
Mickiewicza w Poznaniu; AdE<sup>1</sup>

**Stefan MacGill,** Nov-Zelando/  
Hungario, vic-prez. de UEA

**Aleksandr Melnikov,** Rusio,  
Академия Сельскохозяй-  
ственного Машиностроения

**Radojica Petrović,** Serbio,  
Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha,** Hungario, MTA  
Nyelvtudományi Intézet

<sup>1</sup> AdE – Akademio de Esperanto

**Sur la titolpaĝo supre:** emblemo de ILEI 70-jara; **malsupre:** (de maldekstre): Marc Cuffez, sekciestro de ILEI en Belgio, Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI, Ahmad Reza Mamduhi, sekciestro de ILEI en Irano.

**Sur la dorskovrilo:** Vojaĝo al Slovenio danke al Esperanto (vd. p. 22)

## Enkonduko

### Karaj legantoj,

En la unua numero de IPR 2019 okaze de nia jubilea jaro ni provis skizi la komencon de la instruista laboro kadre de la naskiĝanta Esperanto-Movado.

En tiu ĉi dua numero de IPR 2019 ni provis arigi tekstojn de aŭ pri la ILEI-prezidintoj. Vi malkovros diversajn interesajn aspektojn de ilia laboro por la Ligo. Tiu kolekto plu okupos nian revuon en la tria numero.

Vojaĝado kun gelernantoj kaj klaso-interŝanĝoj havas altan edukan valoron. Pri tio vi legos tri tekstojn en tiu ĉi numero.

Kompreneble ne mankas detalaj informoj pri nia kongreso en Ĉaĉak, Serbio, kiu okazos de la 13-a ĝis la 20-a de julio.

Ni antaŭĝojas revidi vin okaze de ĝi en Serbio.



Ni deziras al vi bonan legadon.

Mireille GROSJEAN  
Prezidanto de ILEI

## Prof. István SZERDAHELYI (1924-1987)

### Prezidanto de ILEI de 1985 ĝis 1987

*Fragmento de artikolo aperinta en IPR 2009/3 - Ilona KOUTNY: „Loke kaj fake, internacie kaj home - Prof. István SZERDAHELYI (1924-1987)”*

#### Enkonduke

La okazon rememori István SZERDAHELYI motivas la 85-jara datreveno de lia naskiĝo (kaj 22-jara de lia morto). Prof. Szerdahelyi estis bonega kaj efika pedagogo, aganta en- kaj eksterlande. Li fondis la E-fakon en la Universitato Eötvös Loránd (ELTE) en 1966 kaj gvidis ĝin ĝis sia morto. Per sciencaj metodoj li provis trovi la lokon de E-o inter la lingvoj naturaj kaj planitaj, lingvistike analizi ĝin, kaj formi instruistojn, lingvistojn kun profundaj konoj pri E-o. Du jarojn antaŭ sia morto li iĝis prezidanto de ILEI kaj dum unu jaro – en 1986 – redaktis IPR-n.

Longa vico da studoj kaj libroj, same ankaŭ prelegoj montras lian vastan interesiĝon kaj grandan labor-kapablon: li prezentis novan aliron al la morfologio, semantiko, etimologio de E-o; kun filologia precizeco li esploris interlingvistikon, kies rezulto estis la universitata lernolibro pri interlingvistiko kaj la populara libro *Bábelről a világnyelvig* 'De Babelo ĝis la mondolingvo'.

Li sukcesis trovi la vojon al diversaj homoj, ĉar li kredis en tio, kion li faris, kaj havis estimon por la aliaj. Tion elstare montras la pretigo de la Hungara-Esperanta vortaro, kie kunlaboris 50 esperantistoj diversfakaj. La rezultoj de lia agado kaj verkaro estas ankaŭ nun aktualaj kaj vojomontraj.

#### 1. Vivovojo – en la ŝtormo de historio



István SZERDAHELYI naskiĝis (20.08.1924, Avas-felsőújfalú, nun: Negrești-Oaș en Rumanio) kaj plenkreskis en la plurlingva Transilvanio. Li finis militakademion kaj paralele ekstudis juron. Li partoprenis en la dua mondmilito kaj estis kaptita. La militkaptitecon li eluzis por lerni la rusan lingvon, kiu poste iĝis lia profesio [*surfote: la juna instruisto*]

Post la mondmilito lia familio transloĝiĝis al Hungario, li finstudis juron en la Universitato Péter Pázmány

(laŭleĝa antaŭulo de ELTE) en Budapeŝto kaj poste rusan filologion. Li ekinstruis la rusan en elementa lernejo en la vilaĝo Kisbér, kie poste li iĝis lernejestro kaj pretigis gimnaziajn lernolibrojn pri la rusa (ankaŭ mi lernis el ili).

En 1956 li aliĝis al la revolucio, pro kio poste li estis malliberigita por pli ol jaro. Tiu evento rompis lian karieron, dum kelkaj jaroj li ne povis akiri instruistan postenon. Fine, en 1963, li ricevis postenon en ekonomika mezlernejo kiel instruisto de la rusa.

En 1949 li esperantistiĝis kaj rapide fervore ekinstruis la lingvon. Ekde la 60-aj jaroj li partoprenis en la laboro de la reorganiziga HEA, li membris en la instrukomisiono kune kun Baghy, Balkányi, Kőkény kaj Pechán. Li kontribuis al la longe uzata *Gvidlibro por supera ekzameno*, kaj laŭ lia propono ekestis la trigrada ekzamsistemo. HEA kaj la tiama prezidanto Antal KOÓS subtenis lin ĉe la fondo de E-fako en ELTE. Kvankam la rilatoj inter Szerdahelyi kaj HEA ne estis ĉiam tiel proksimaj, dum la lastaj du jaroj de sia vivo li iĝis vicprezidanto de HEA.

Li verkis artikolojn kaj librojn, sciencajn kaj sciencopopularigajn, instrumaterialojn, multe prelegis en Hungario kaj en aliaj landoj en Esperanta medio (vd la kompletigantan bibliografion en la *Memorlibro*).



Li havis bonajn kontaktojn i.a. kun la *Kultura Centro Esperantista* en La Chaux-de-Fonds (Svislando), kunlaboris kun la paderborna *Kibernetika-Pedagogia Instituto* (Germanio) pri lingvo-orientada instruado, kun Internacia Kultura Centro en Zagrebo (Kroatio) kaj ofte publikigis siajn vidpunktojn pri sciencaj temoj en *Literatura Foiro*.

Liaj pedagogiaj artikoloj aperis ofte en IPR kaj fine li prenis la merititan lokon de ILEI-prezidanto (1985-87) kaj iĝis honora membro de UEA [*surfote: Szerdahelyi en 1986*].

Post gravaj konfliktoj pro lia alia aliro al la radikarkteroj ankaŭ la Akademio de E-o elektis lin al siaj membroj en 1986. Post multe da sindediĉa laboro kaj batalo por la rekonigo de scienca agado pri E-o en kaj ekster Esperantio li mortis la 21-an de aŭgusto 1987 en Budapeŝto.

## 2. Fondo de E-fako en ELTE – elstara pedagogo kaj metodikisto

István Szerdahelyi batalis por la enkonduko de E-o en la lernejojn, elstarigis la propedeŭtikajn valorojn de E-o, kiuj por hungaroj estas nekontesteblaj. En 1963 E-o estis jam instruata en kelkaj hungaraj lernejoj. La lerneja instrueblo motivis la peton por la universitata formado de E-instruistoj. Li sukcesis krei ion unikan, kiam li fondis la E-fakon en la Universitato Eötvös Loránd (konata sub la siglo ELTE) en 1966 kun la subteno de la konata lingvisto Géza BÁRCZI.

Li ekiris malfacilan vojon, kiam li surprenis sola sur sin la E-fakon: li devis organizi el nenio la plurjaran kompleksan kursaron, similan al filologio (kun lingvistiko, literaturo... metodiko), kiu gvidis al universitata diplomo; krei studplanon kaj studmaterialon, instrui kaj esplori.

D-ro Szerdahelyi strebis prezenti al la scienca mondo la valorojn de E-o, akceptigi esperantologion, en pli vasta senco interlingvistikon kiel lingvistikan branĉon (feliĉe la E-fako ekfunkciis kadre de la *Lingvistika katedro*) kaj konvinki esperantistojn pri la neceso de scienca esploro de E-o. Por tio necesis multe da laboro kaj la speciala personeco de István Szerdahelyi. Li, ne ŝparante sin, kun ĝojo laboris kaj sukcesis trovi la vojon al diversaj homoj.

Li verkis universitatajn lernolibrojn: *Esperanto* (1972), *Metodologio* (1975), *Interlingvistiko* (hungare, 1980), kompilis 3 volumojn de *Literatura Krestomatio* (1979, 1981, 1982). Aliajn gravajn tekstojn siajn, de kolegoj kaj gestudentoj li aperigis en *Esperantologiaj kajeroj I–III* (1976, 1977, 1977), kunlaborigante siajn gestudentojn.

En 1978 la E-fako organizis internacian interlingvistikan konferencon, kies materialo aperis en *Miscellanea Interlinguistica* (1980).

Dume li restis ĉarma kaj amuza interparolanto, kiu altiris homojn, kaj ĝisosta pedagogo, kiu kapblis ekŝatigi la studmaterialon. Li engaĝis en la sciencon laboron siajn gestudentojn, kiuj partoprenis en scienca studenta rondo, sendis ilin al konferencoj, kunvenoj, se eblis eksterlandaj, kaj trovis taskojn laŭ ilia emo kaj helpis ilin en la realigo – tiu sinteno estas malofta en universitatoj. Ekzemple li sendis min staĝi al KCE (franclingva Svislando), kio signifis por mi grandan travivaĵon.

Li estis „vera pedagogo, kiu kapblis transdoni vivosperton, sian optimismon, laboremon, estimon de la scienco...”. Ni, gestudentoj tre ŝatis lin, mia generacio nomis lin *Paĉjo* inter si.

Dum lia 21-jara instruado en la E-fako preskaŭ 100 gestudentoj diplomiĝis pri E-o en la tagaj kaj (ekde 1972) t.n. korespondaj kursoj, el inter kiuj kelkaj havas nun gravan rolon en la E-movado. Ili kunvenis en 1986 por kune festi la 20-jariĝon de la fako. Naskiĝis ankaŭ multaj diplomlaboraĵoj pri esperantologio kaj interlingvistiko, ilia konservo, prilaboro kaj daŭrigo necesus.

### 3. Esploroj pri lingvopedagogio

Szerdahelyi esploris la leksikan materialon de diversaj lingvoj en la lerneja instruado kaj komparis ilin helpe de la gestudentoj. Li gvidis eksperimentojn por pruvi la lernfacilecon kaj propedeŭtikan valoron, t.e lernfaciligon de E-o.

La plej grava estis la 5-landa eksperimento inter 1971-74, en kiu partoprenis Bulgario, Italio, Jugoslavio, Aŭstrio kaj Hungario. La celo estis prezenti la facilecon de E-o, ĝian efikon en la kompreno de la gepatra lingvo kaj fremdaj lingvoj (tion reprenas ankaŭ la nuna projekto *Lingvolanĉilo!*), la propedeŭtikan valoron de E-o por la sekva fremda lingvo.

Li bone vidis, ke la pli facila alproprigeblo de iu lingvo dependas ne nur de ĝia strukturo (absoluta facileco), sed ankaŭ de la rilato kun la gepatra lingvo de la lernanto (relativa facileco).

Por hungaroj E-o kun siaj hind-eŭropaj trajtoj kiel la prepozicia sistemo prezentas modelon de hind-eŭropaj lingvoj, ĝia lernado helpas ankaŭ la komprenon de scienca vortprovizo en la hungara, sed per maksimuma simpleco. Tio alportas pozitivan psikan valoron en la regado de la lingvo. Li konkludas, ke E-o estas neŭtrala kontaktilo, lingva kaj kultura sintezo, tiel enhavas *internacian kulturan potencialon*.

Nur la motivado por E-o estas malgranda kompare kun la angla, li konsideras, ke esperantistoj devus eliri el sia interna mondo, kaj trovi sian lokon en la ekstera establita mondo por ke oni prenu ilin serioze.

La konkretajn esplorrezultojn li povis proponi al oficialaj instancoj por serioza pritraktado de E-o kaj fruktuzis en siaj lernolibroj. *Esperanto internacia* 1-2 – origine por infanoj – estis kaj estas uzata por instrui junulojn.

[...]

#### **Sonmaterialoj de Szerdahelyi:**

<http://www.ilei.info/hungario/sonmaterialoj.php>.

## Komence estis la tondilo

*de István ERTL (Hungario/Luksemburgo)*

Kiam mi estis petita verki rememorojn pri mia redaktora tempo ĉe IPR, mi kompreneble iris al mia subtegmento por konsulti malnovajn numerojn – kaj ne retrovis ilin. Kvazaŭ tiu mia pasinteco estus tiom fora ke eĉ spuroj ne restis de ĝi. Ĉu mi ilin fordonacis?



Kaj tamen, kiom vigla kaj spertoriĉa periodo estis por mi tiuj jaroj 1987–1991! Fakte, miaj unuaj jaroj en Esperantujo.

Ke mi lernis la redaktoran metion, mi povas danki al la revuo IPR, kaj la revuon IPR mi povas danki al István SZERDAHELYI, kiu iel ekvidis en mi la potencialon transpreni la torĉon.

En tiu fora tempo oni eĉ redaktis per tondilo kaj glubendo! Prof. SZERDAHELYI alportis tiujn objektojn al nia duopa kunsido, en kiu li transdonis al mi... la redaktorecon, kaj precipe bonajn konsilojn – specife: kiel tranĉi artikolojn, tranĉi ne nur enhave-redakte sed ankaŭ fizike-tondile...

Nur 22-jara, mi ekredaktis la revuon, kaj daŭrigis tion dum kvar jaroj. Kompreneble, enorme fierigis min ke mi estas „ĉefredaktoro” (!) de „internacia” (!) faka revuo... certe, troviĝis iuj kiujn tio malpli impresis, ĉe la kompreno ke tio realiĝas ne per iu prestiĝa lingvo kiel la angla, franca, germana aŭ rusa, sed per la stranga lingvo Esperanto.

Iujn manuskriptojn mi redaktis per skribilaj signoj sur la margenoj, sed multajn mi devis retajpi, ofte ĉirkaŭ noktomezo en la familia kuirejo. En tiu epoko antaŭ Interreto, apenaŭ eblis aŭ indis kontakti aŭtorojn por peti detalojn aŭ konsenton pri redaktaj ŝanĝoj; mi do ankaŭ lernis kiel agi diplomatie sed rezolute pri tiaj tekst-intervenoj. La rezulton, redaktore „pretan” numeron, t.e. aron da paperoj tiel redaktitaj, mi sendis al Antverpeno, kie la Grafika Centro de UEA zorgis pri la enpaĝigo. Kaj post pluraj semajnoj finfine mi vidis ankaŭ la paperan rezulton, la aperintan numeron poŝte ekspeditan.

Se diri honeste, mia persona intereso pri pedagogio, kaj aparte pri metodiko, estis ĉiam malalta. (Mi ja fariĝis poste mem mezlerneja instruisto du jarojn, sed nur pro neatendita nuliĝo de posteno kiel eldoneja redaktoro.) Sed eĉ tio instruis al mi ion: kiel agi laŭeble profesie en kampo por kiu oni ne sentas



profundan pasion. Sperto kiun plej multaj devas apliki, beaŭrinde aŭ ne, dum granda parto de sia vivo.

Pasion mi tamen sentis por Esperanto, kaj mi baldaŭ krome eksentis ion alian, signifan por redaktoro kaj fakte por ajna ĵurnalisto: la gravecon de kontaktoj kun la legantaro! Vigligas konscii ke oni ne laboras en vakuo, sed ke homoj efektive atendas novan numeron de sia periodaĵo, mem sendas kontribuojn, persone dankas pro la laboro farata, kaj eĉ fordonas al la redaktoro sian tagmanĝon, kiel faris la ĉarma s-ino Catina DAZZINI en konferenco de ILEI – tiam oni konstatas ke oni ludas atentatan rolon en vivanta komunumo.

Post mia redaktora periodo, mi (tiam kiel redaktoro de la UEA-revuo) unue iom sekvis la evoluon de IPR kaj la vivon de ILEI, sed poste tamen ĉiam malpli kaj malpli. Sed ja sufiĉe por konstati ke IPR kaj ILEI restas inter la Esperantuje plej viglaj revuo kaj faka asocio respektive.

## **Edward SYMOENS (1915-1995)**

**Prezidanto de ILEI de 1987 ĝis 1991**

*de Margaretha SYMOENS (Belgio)*



Esperanto por la familio de Edward SYMOENS ne estis io nekonata. La ses infanoj konsciiis tre bone, kian grandan signifon havas Esperanto en la vivo de mia patro. Ekde kiam mi eklernis Esperanton, mi malkovris lian senliman engaĝiĝon kaj entuziasmon.

En la jaro 1992 mi la unuan fojon akompanis mian paĉjon dum la Universala Kongreso de Esperanto en Vieno. Tie mi rimarkis, ke li multe signifas por la kongresanoj. Li disradiis sian

kredon je la valoro kaj forto de Esperanto.

Mia patro 100-procente sin dediĉis al Esperanto kaj ĝiaj parolantoj. La amikeco kaj la kunligo, kiuj estis videblaj kaj senteblaj dum la kongreso(j) ĉiam feliĉigis lin. Kiel pedagogo li multe esploris la temon „Propedeŭtika

valoro de Esperanto”. Li ankaŭ gvidis studentojn skribi disertaĵojn pri Esperanto kaj interlingvistiko.

Nun, 24 jarojn post lia morto, mi volas sciigi al vi (ankaŭ al li), ke lia plej juna nepino, la 16-jara Jana propravole lernas Esperanton pere de *Duolingo* angla-Esperanto. Ŝi jam dufoje partoprenis kun mi en la Novjara Renkontiĝo en Germanio.

Jana estas tre entuziasma pri la lingvo kaj ŝi jam povas sin bone esprimi en la lingvo, al kiu ŝia praavo Edward SYMOENS dediĉis sian vivon ekde sia juneco (17j) ĝis la morto.

## Mauro LA TORRE (1946-2010)

Prezidanto de ILEI de 1998 ĝis 2003

*de Luigia OBERRAUCH MADELLA (Italio)*



Mi konatiĝis kun profesoro LA TORRE pere de le projekto ESP<sup>2</sup> en la jaroj 1996-97. (IPR 4/1998 sur la tria paĝo prezentis lian foton kaj mallongan biografion, skize parolante ankaŭ pri tiu ĉi iniciato.) La projekto nomiĝis „Didaktika eksperimento pri la efikoj de lernado de planlingvo”.

Ĝi antaŭvidis la ne-ĉeestan formadon de instruistoj, kiuj deziris eksperimenti. La projekto estis organizita kaj financita

fare de la Tria Universitato de Romo, Departemento pri Edukaj Sciencoj, Laboratorio de Eksperimenta Pedagogio.

En la jaro 1998 la itala Komisiono de Unesko aprobis la projekton de interkultura edukado pere de Esperanto. La projekto daŭris du jarojn kaj havis skriban kaj parolan finan ekzamenon en Romo. Tiam mi renkontis por la unua fojo Mauro LA TORRE persone. Li estis tre afabla kaj kapabla konstrui rilatojn kun la gestudentoj ankaŭ parolante pri la problemoj de lingvaj minoritatoj, kiuj ja gravas por mia devena regiono de Italio ĉe la piedoj de Dolomitoj. Tie li kutime pasigis la libertempajn somerajn monatojn

kune kun la familio, studante en malgranda vilaĝeto sen la konfuzego de la granda metropolo. Tamen li ne forgesis la gravecon de la projekto de la virtuala lernejo kaj li ĉiam esperis ke, se ne komplete li mem, iu povos realigi ĝin.

Tiam interreto ekestis ĵus havebla kaj profesoro LA TORRE vidis eblon uzi ĝin por la interkultura edukado, ĉar estis antaŭvidita la partopreno de pluraj klasoj el malsamaj landoj. „Tiu ĉi estas ankoraŭ nun tre aktuala temo”, asertas lia edzino sinjorino Margerita. „La instruado por li estis valora agado kaj eĉ pli en la Esperanto-movado. La lernejo, laŭ Mauro, havis antaŭ ĉio la funkcion de kultura interŝanĝo”, aldonas sinjorino La Torre.

Li estis spertulo pri komputiloj kaj programisto. Do li mem desegnis la programon. Li mem projektis en la reto la virtualan lernejon, kiun li bone prezentis en Lovran (Kroatio) dum la ILEI- konferenco en 2001. Tiu virtuala lernejo enhavis lingvan laboratorion, bibliotekon, salonon por la gazetaro kaj salonon por la ekspozicioj. Kaj estis antaŭviditaj ankaŭ multaj klasĉambroj por individuaj ŝtatoj kiel Kanado, Italio, Ĉinio, Usono, Pakistano k.a. Li imagis 20 klasojn en ĉiu parto de la mondo. Li pensis, ke pere de interreto la klasoj povos kunlabori kaj tio estis lia granda deziro.

Li elspezis multe da tempo kaj pasia energio por realigi tiun ĉi lernejon. Verdire nun estus ankoraŭ pli da ebloj plene realigi tiun projekton, dank' al la evoluo de interreto kaj ciferigaj teknologioj.

Sed terura malsano forrabis lin de ni. Dum nia kunesto en Lovran li kuraĝigis min preni la respondecon pri la itala sekcio de ILEI, ĉar Carla DE LORENZI, kiu estis la prezidantino, havis san-problemojn kaj ne posedis komputilon. Pro tio ŝi petis la profesoron, ke oni donu la taskon al alia homo kaj tiu estis mi.

En tiuj du jaroj de eksperimentoj kunlaboris ankaŭ profesorino Elizabeta VILISICS FORMAGGIO. Ŝi verkis poste la 2 lernolibrojn „Ludu kun ni” ankaŭ dank' al tiu sperto. La bazo por la kurso kaj la libro estis sugestita de la sciencaj studoj de Helmar FRANK de la universitato de Paderborn (Germanio).

Plaĉas al mi ankoraŭ citi aserton de la vidvino de profesoro Mauro LA TORRE: „La engaĝiĝo je la studado kaj disvastigo de Esperanto estis tre forta en mia edzo.”

## Stefan MACGILL (1948 - )

Prezidanto de ILEI de 1991 ĝis 1993 kaj de 2009 ĝis 2013

Prezidado, kun lokoj de la ILEI-Konferencoj: 1991 (Voss)-1993 (Valencio) kaj 2009 (Krakovo)-2013 (Herzberg)

*de Stefan MACGILL (Hungario)*



*Ni estraro en la jaro 2009 en Kubo (de maldekstre): Julija BATRAKOVA, Duncan CHARTERS, Stefan MACGILL, Małgosia KOMARNICKA, Zsófia KÓRÓDY kaj Radojica PETROVIĆ*

El la frua periodo, elstaras la revivigo kaj fortigo de la ekzamenoj de UEA kaj ILEI, ke ĝi havu internacian reton de prizorgantoj. Kiam mi estis la sekretario kaj motoro de la ekzamenoj de 1989-1993, okazis 41 sesioj en tri kontinentoj kun 335 sukcesantoj.

Ĝis la nasko de KER, tiuj ekzamenoj estis la ĉefaj (kaj solaj) internaciaj ebloj por montri siajn kapablojn pri lingvuzo kaj movada sciaro. Vidu IPR, numeron 1993/4 p. 31-36.

La prezidaj jaroj ekde 2009 estis karakterizitaj per egaj fonaj klopodoj, kiuj lasis spurojn ĝis hodiaŭ en la oficiala retejo de ILEI.

## **Fortigo de la rilatoj kun Landaj Sekcioj**

La konkreta rezulto de tio estas detalaj ĉiujaraj raportoj de la sekcioj, kiuj aperis en la retejo de ILEI de 2009 ĝis 2016. En 2012, la proporcio de respondintaj sekcioj atingis laŭdindajn 87%.

## **Aperigo de multaj historiaj dokumentoj**

Tiu parto de la retejo de ILEI estis starigita en 2010, kaj nun enhavas 29 dokumentojn aŭ enskribojn. Elstaras inter ili unikaj leteroj el 1950 kaj raportoj de Violet C. NIXON, la unua prezidantino de la Ligo. Tiuj atingis min pro la diligenta arigo de historiaĵoj en la finna sekcio.

## **Novigo de la Statuto kaj Ĝenerala Regularo**

En 2011 ILEI pioniris en la movado, per okazigo de 55 perretaj voĉdonoj de la komitato. Multaj el tiuj voĉdonoj aprobis modifojn kaj bonigojn en la Ĝenerala Regularo. En la Statuto pliaj gravaj ŝanĝoj estis akceptitaj de la Komitato en Kopenhago, rapidigita per laŭpaŝa prezento de ĉiu unuopa propono per projekciado.

## **Regula raportado**

La komitatanoj kaj sekcioj ricevis ekde julio 2009 raporton 'la unuaj 30 tagoj'. Sekvis similaĵoj por 60 kaj 100 tagoj kaj ses monatoj. Similo okazis por la lastaj 30 kaj 60 tagoj. Vidu ĉe *ILEI > Agado > Superrigardo*. Tio pavimumis la vojon por la nunaj trimonataj raportoj.

## **Gvidiloj kaj helpiloj**

Ni pretigis gvidilojn por oficoj: prezidanto kaj kasisto, krome pri renkontiĝoj, eksteraj rilatoj, pretigo de *Simpoziaj Kajeroj*, por la agantoj pri *Juna Amiko* kaj diversaj proceduroj. La helpiloj inkluzivas unikan inversan vortaron, kiun ILEI transigis al rete alirebla formo, kaj la multloke prezentitan temaron „Verve pri Verboj”. Trovu ilin sub *ILEI > Dokumentoj > Gvidiloj / Helpiloj*.

## **Partneroj**

ILEI en 2010 kreis la kategorion „Partneroj” kun arigo de la reto de 11 instancoj, pri kiu aperas informoj ĉe *ILEI > Instancoj > Partneroj*.

## Ĉiuj Anglujen

Rimarkoj pri studvojaĝo lingvolerna el esperantista vidpunkto -  
*Sprachenfahrt nach England aus esperantistischer Perspektive*

de Bernhard SCHWAIGER (Germanio)

*„Heute waren wir in nicht weniger als fünf Ländern!“ So der begeisterte Ausspruch eines Schülers nach unserer Ankunft in England am Abend. Ich nahm das als Anlass darüber nachzudenken, was gewesen wäre, wenn wir unterwegs stehen geblieben und überall, in gut europäischem Geist, eingekehrt wären. Freilich hätten wir dann für eine solche multikulturelle Sprachenfahrt ein gemeinsames und neutrales Idiom für alle (u.a. Deutsche, Holländer, Flamen, Franzosen, Engländer) gebraucht. Esperanto zum Beispiel...*

*„Hodiaŭ ni estis en ne malpli ol kvin landoj!“ Tiel esprimis sin iu lernanto post nia alveno en Britio vespere. Tio pensigis min, kaj mi imagis, kio estus okazinta, se ni estus devintaj ie halti kaj eniri ian gastejon, kiel estas kutimo en eŭropa spirito. Evidente por tia multikultura lingva vojaĝo la plej bona solvo estus, ke ni havu iun komunan kaj neŭtralan idiomon por ĉiuj (inter aliaj germanoj, nederlandanoj, flandroj, francoj, britoj). Esperanto ekzemple...*

Mi devas konfesi: ankaŭ personaj kialoj interesigis al mi partoprenon kiel akompananta instruisto en la ĉi-jara lingvopraktikadvojaĝo de la klasoŝtupo naŭa al Anglio. Mi simple ankoraŭ ne estis en la Unuiĝinta Reĝlando, afero kiun kelkaj gelernantoj eĉ ne povis aŭ ne volis kredi. Certe, inter ili ankaŭ samsortanoj estis sed aliaflanke ankaŭ kelkaj, por kiuj Anglujo ne estis malkonata lando. Devige kiel la plejmulto de eŭropaj (mondaj!) lernantoj ankaŭ mi iam estis lerninta la anglan lingvon en mia lernejo. Pri Esperanto mi tiam neniam aŭdis, do mi estis en la sama situacio kiel la plejmulto de la nunaj gelernantoj, kvankam ili, danke al ĉiam enpoŝe disponebla interreto, devus esti pli bone informitaj ol mia generacio. Al ni en la 1980-aj jaroj klaris, ke la angla ne nur gravus sed ankaŭ estus monda lingvo. Mi ne povis memori iun personon en mia ĉirkaŭaĵo, kiu dubus pri tiu ĉi ŝajna fakto, nek enfamilie nek eksterfamilie. Sen paroli pri niaj profesoroj gimnaziaj.

Ĝenerale oni ja estis malpli kritikema ol hodiaŭ, eble ankaŭ malpli demandema. Ĉu iu el miaj lernigintoj – almenaŭ private – pensus alimaniere? Mi ne scias. Ĝenerale kontakto kun aliaj kulturoj, ekz. plej simple pere de

malsamoriginaj samklasanoj, tiam estis malofta. Vidi kunportitajn librojn aŭ gazetojn negermanlingvaj kvazaŭ sensaciis (ili ankaŭ ekzistis ĉe kioskoj en pli grandaj urboj, sed ne en mia mezgranda salzburga provinckomunumo!) kaj bretaroj kun fremdlingvaĵoj en kelkaj librovendejoj furoris. La angla estis vere „fenestreto al la mondo”, ĝi tute sufiĉis. Post kvar gimnaziaj jaroj alvenis nova fremdlingvo, la franca, sen ŝanco por la lernantoj elekti - almenaŭ kiel duan vivan lingvon - alternativon. Sed ankaŭ tiun ĉi hegemonion neniu pridubis. La angla kaj la franca kaj la latina (kiun mi persone baldaŭ ekuzis kiel komunikilon vivan kun aliaj junuloj el tuta Eŭropo; sed tio estus alia historio...) sufiĉis. Brition, mi jam diris, mi neniam vidis antaŭe, nek private nek dumgimnazitempe. Sed Francandon jes ja: 16 jaraĝaj ni vidis Parizon kaj Havron restante dum pluraj semajnoj ĉe gastigfamilioj, frekventante instruhorojn, farante ekskursetojn tra la bela Normandio. Okazis ankaŭ reinvito de niaj francaj amikoj: nun la franco devis uzi la germanan lingvon en mia patrujo kiel antaŭe mi ĉe li la francan. Bona ideo, praktika uzo de fremda lingvo, aŭtentika enfamilia vivo, sperto de alikultureco.

Ŝajne io ŝanĝiĝis, multe. Nia lernejo en 2018 ne faris veran interŝanĝon: organizaĵo angla specialiĝinta pri perado de familia gastigo por lernantoj el la tuta Eŭropo faris la necesan laboron. Ne plu temis pri iu reciprokeco, pri ambaŭparta konatiĝo, sed pri simpla ĝuo de angla vivo fare de germanaj lernantoj. Pri tio la organizaĵo pera tute ne kulpas - ni mendis kaj ni ricevis servojn. La familioj memkompreneble estas pagitaj kaj kelkaj gastigas plurfoje lernantojn – du, tri, kvar aŭ eĉ pli – ĉe si, lernantojn el la tuta mondo. Indas konstati, ke ne temis pri iu reciprokeco, neniu familio de niaj lernantoj poste en Germanio gastigis anglon aŭ anglinon junan. Maleŭropa pensado - ĉar normale plurkultureco ĉe eŭropaj interŝanĝprogramoj ĉiunivelaj unuavicas kaj gravegas. Diferenco alia ĝenerala inter mia kiellernanta vojaĝo kaj la nuna kielinstruista vojaĝo estis la jeno: antaŭ tridek jaroj organizado estis pli leĝera, gepatroj estis malpli zorgemaj en la pozitiva senco kaj transdonis pli frue multan respondecon al siaj gefiloj. Kontrolo dum nia restado en Francando fare de niaj gepatroj ne eblis – simple pro manko de ankoraŭ ne ekzistantaj poŝtelefonoj kun Vacap-funkcio. Ni vere estis, de unu momento al la alia, mergiĝintaj en francan vivon. Krome ni havis po unu gastigan familion kaj ne estis kun aliaj samklasanoj en unu franca familio; germanlingvaj momentoj ekzistis nur dum la ekskursoj eksterfamiliaj kaj renkontiĝoj enlerneje. Mergiĝo pro la pli longa daŭro de la restado aŭtomate estis ankaŭ pli intensa kaj fruktodona. Hodiaŭ la fenomeno de rekta kaj intencata gepatra enmiksiĝo ekzistas ankaŭ sur aliaj kampoj: diference de

fruaj generacioj la nunaj junuloj ĝenerale pli enlasas la gepatran mondon en sian vivon, ne nur danke al perinterreta ĉie-ajna kontakteblo. Antaŭ kelka tempo mi mirante aŭdis, ke hodiaŭ gepatroj akompanus la gefilojn eĉ al universitato, planus kune kun ili la karieron ktp. Psikologie ja interese – sed tio ne estas la temo de nia artikolo kaj sekve mi ne plu esploros prie.

Ni pli bone revenu al la konkreta vojaĝo disde Turingio al la promesita lando Anglujo. En grandega buso ne malpli ol sepdek gelernantoj kaj ses akompanantoj scivolemaj alproksimiĝis al relative malproksima lando. La moviĝo enbusa iris glate dum la tuta vojaĝo norden. Ekde kelkaj jaroj multekostaj eksterhejmlandaj tarifoj poŝtelefonaj kaj interretaj estis forigitaj, tiukampe Eŭropo jam perfekte funkcias. Ankaŭ doganaj kaj landlimaj kontroloj en la Schengen-areo ne plu estas. Tial neniu rimarkis, kiam estis trapasitaj la landlimoj inter Germanlando kaj Nederlando, inter Nederlando kaj Belgio, inter Belgio kaj Francio. Nur la angloj ankoraŭ kontrolas pasportojn – nekonata afero por kelkaj lernantoj. Tio plaĉis al mi (ne la kontrolo sed la fakto, ke por kelkaj tio estis la unua fojo esti kontrolataj: vivu Schengen por ĉiam!), ĝojigis min ankaŭ la fiera eldiro kiun mi aŭdis post la atingo de brita tero en Dovro post pramsipvojaĝo disde Kalezo, nome ke ekde la mateno oni estas trapasinta ne malpli ol ses landojn! Oni ankaŭ trapasis apud multaj gravaj urboj post Germanio: mi nur citu Eindhoven (NL), Antverpenon, Genton, Bruĝon, Ostendon (BE), Dunkirkon (FR). Nur enkrampe mi honte kaj memkritike konfesas, ke mi ne prepariĝis kaj sekve ne povis almenaŭ elbuse ĉiĉeronadi... Kaj post laciga vojaĝo ĉiuj feliĉis ĉe vespera alveno en Hastings kaj la Manika Markolo.

La tagoj malmultaj pasis normale; post la alveno dimanĉa kaj ekgastado ĉe gastigaj familioj ni apud Eastbourne promenis sur klifoj dum veteraĉo antaŭ posttagmeza frekvento de instruhoroj de la angla lingvo fare de denaskuloj. Marde buse estis atingita Londono kun prokrasto pro trafikŝtopiĝo: tamen oni povis ankoraŭ ĝui surlokan enbusan turon por spekti la ĉefajn vidindaĵojn kaj fari etgrupan gapvagadon. Merkrede ni estis en Canterbury, fama ĉefe pro la katedralo (sidejo ĉefepiskopa) kaj la Rakontoj el Canterbury, antaŭe ni estintis ankoraŭ en la idilieca urbeto Rye, ano de la fama federacio de la Kvin havenoj. Ĵaŭde estis atingita Grenviĉo kun antaŭa vizito de la rekonstruita Globusteatro ŝekspira. Finfine alvenis vendredo, kiam tra la malnova urboparto de Hastings okazis rondgvidado antaŭ esploro aŭ de la burgo (la unua starigita en Anglujo laŭ komisiio de Vilhelmo la Konkerinto) aŭ de la kontrabandistaj kavernoj. Ĝuste antaŭ la ekvojaĝo enpatrujen estis denove ne malpli ol tri lingvo-instruhoroj. Petite observi unu grupon de niaj



lernantoj, mi pli-malpli libervole ĉeestis la instruadon de la angla lingvo fare de tri anglaj instruistoj. Fakte ĉi tiu instruobservado evidentiĝis esti interesege. Sincere dirite, mi entuziasmiĝis nek pri iliaj metodoj nek pri la temoj preparolotaj. Komparante tion kun la instruado de fremdaj lingvoj en nia lernejo, mi konvinkitis ke nia hejma provizado per fremdlingva instruado tute ne pli malbonas, eĉ eble pli bonas. Instruado fare de denaskuloj sole ne aŭtomate garantias altkvalitan klerigadon! La lasta „kolego” angla je la fino de sia instruado aldone faris kelkajn minutojn propagadon por la angla lingvo kiel monda lingvo. La germana junularo, ne konante alternativon kontraŭe al ni esperantistoj, eltenis senprotesteme tian malneŭtralan reklamon. Verŝajne eĉ la angla kolego tute sincere kaj sen malico laŭdegis la gloron de sia gepatra lingvo. En tiu ĉi momento mi balzame memoris oftan aserton eĉ de anglalingvuloj inter la esperantistaro, ke la angla ne taŭgas kiel monda lingvo.

Lasu min nun, karaj gelegantoj de tiu ĉi modesta kontribuaĵo al la ĉi-jara jarlibro, preni la rolon de advokato de la diablo kontraŭ la laŭaspekte ne kontraŭdirita magia mondo de anglalingva hegemonio en laŭdifine pli bunta Eŭropo! Same kiel multaj aliaj karavanoj (ni tute ne estis la ununuraj – busŝoforoj specialiĝintaj pri transporto de lernantoj eĉ salutis tie en Britio kelkajn bone konatajn kolegojn) ankaŭ ni venigis gelernantojn niajn al Kuklando anglalingva. Mi tute ne enviis al la angloj turismon tian florantan venante eĉ el Aŭstrio, turismoplena lando. Similaj estintus vojaĝoj en Francujon dum la 19-a jarcento kaj pli frue kiam la franca ankoraŭ gravis, se infrastrukturo simila jam ekzistis. Verŝajne ankaŭ Germanlingvio eĉ nun profitas de la daŭre grava rolo de la germana, pro kio multaj elektas Germanion, Svislandon, Aŭstrion kiel turismajn celojn. Usono ofertas eĉ pli multon – lingvan enmergiĝon kune kun liverado de la t.n. „amerika revo”.

Sed la mondo ŝanĝiĝis! Tutmondiĝo bone komprenata ampleksu pli multon, nome ĉiujn kulturojn. Prenu ni ne la tutan mondon sed limiĝu je Eŭropo ekskluzive: tie oni ĉiutage sentas la mankon de vera eŭropa sento ĉe multaj homoj. Ne nur parton de nia kara kontinento ni sopiras, ni volas la tutan vivante en Eŭropa Unio, estante eŭropaj civitanoj. Ĝuste de ni instruistoj klopodatas pretigo de gelernantoj al kultura riĉeco, postulatas fortigo de tuteŭropa sento, bezonatas elradikigo de el familioj aŭ amikaj rondoj kontinuitaj antaŭjuĝoj kontraŭ aliuloj – kaj kion ni faras?? Kvazaŭ la kontraŭon! Veturante tra multaj belaj eŭropaj landoj kaj vidante disde la aŭtoŝoseo ene de unu tago brilajn urbojn kaj regionojn, ni venigas la gelernantojn al la ununura promesita lando same kiel nenombreblaj aliaj

eŭropaj instruistoj karavanpartoprenantaj en sankta haĝo al la lingva Mekko. Briteliro kontraŭeŭropa tute ne gravas ŝajne, ne alipensigas iun. El la vidpunkto mediprotekta ankaŭ frenezaĵo, ĉu ne? Ĉar antaŭ la pordoj de Turingio situas aliaj kulture, nature kaj historie interesegaj landoj multe pli facile, rapide kaj benzinspare atingeblaj: Ĉeĥio kaj Pollando. Sed ŝajne ambaŭ ne interesas koncerne la lingvon.

Estante esperantisto mi de tempo al tempo ridetas pri la naiveco de kelkaj samideanoj. Travivinte tiun ĉi lingvan interŝanĝeventon (sen iu interŝanĝo aŭtentika, ĉar la angloj koncernitaj ne havis ian ŝancon ĝui la germanan lingvon...) mi daŭrigos defendi la gravecon de Esperanto brilantan denove kaj intense antaŭokule. Veturante preter la cititajn urbojn kaj travojaĝante tiom multajn landojn antaŭ la feliĉa albordiĝo en suda Anglujo, mi revis pri eliro disde la aŭtostratego kaj pri enmergiĝo rekta en Nederlando / Belgion / Francujon danke al Esperanto, pri renkontiĝoj inter niaj germanaj junuloj kaj aliaj junuloj de ĉiuj survojaj landoj. En Anglujo, sentante la propran malsufiĉon lingvokonan, mi demandis min, ĉu ne la angloj mem sentus sin pli komfortaj se ankaŭ ili havus, danke al Esperanto, egalecan komunikadon kun Eŭropo. Verŝajne, se Esperanto normalus en eŭropaj lernejoj, ni eĉ ne atingus Anglujon havante tiom belajn landojn survoje; sub tiaj kondiĉoj miaj programoj pri esperantistigo de la angloj aŭtomate vanus, ĉar ĝi ne plu necesus.

Kritikantoj povus atentigi min ke jes ja ekzistas jam nun kelkaj lernejoj en Eŭropo, kiuj entreprenas sukcesajn interŝanĝojn pere de Esperanto, ke tiukampe iniciatoj estus apogataj eĉ de Bruselo, ke mi ne nur kritiku sed pli bone aktive kaj konkrete agu. Mi kapjesos kaj pente la bruston al mi batos. Varbadon por Esperanto tamen lacigas kaj ankaŭ lacigis min: la guto malgranda, konstante frapante, kiu traboru la monton granitan - ĝi tro ofte rapide post mallonga apero malaperas. L'espero, l'obstino kaj la pacienco ankaŭ bezonas disdoniĝon sur la ŝultrojn de pli da soldatoj por la bona afero, en nia lernejo, inter la gepatroj, en Erfurto, en la tuta Eŭropo. Intertempe optimismo volas esti atendata. Tamen la sento restanta jenas: multaj estas kontentaj pri la nuna unudirekta lingva situacio, kiu ja povus esti tiom pli efika kaj feliĉa.

---

**Mireille GROSJEAN atentigas pri la Raporto GRIN, kiu analizas la situacion de Britio en la nuntempa vaste disvastigita tendenco lerni la anglan.**  
*[https://eo.wikipedia.org/wiki/Raporto\\_Grin](https://eo.wikipedia.org/wiki/Raporto_Grin)*

*Rabindranath TAGORE* (1861-1941) el Barato/ Hindio, estis verkisto, filozofa, muzikisto, pentristo. En la jaro 1913 gajnis la Premion Nobel de Literaturo kaj estis la unua neeŭropano, kiu atingis tion.

En [www.eo.wikipedia.org](http://www.eo.wikipedia.org) aperas interesa analizo lia pri la brita klerig-kulturo. Notindas, ke nenio tia aperas en vikipedio en la germana, angla, franca....

## **Kritiko de la brita klerig-kulturo**

Kategorioj, kiuj malebligas realigon de la eduk-idealo:

- manko de harmonio inter individueco kaj la socio (inter unuopulo kaj la universo)
- manko de harmonio inter individuo kaj la naturo
- fragmenta traktado de la homa persono
- spirita mondo traktata kiel apartigita superkonstruo propra al la konscio de elito
- neglektas kaj malprofundigas la ekzisto-sencon de infano, malheredigas ĝin de la bezono senpere kontaktiĝi kun multoblaj formoj de la mondo kaj de la natura inklino kontaiĝi kun universalajoj
- dominado de kolektado de informoj, kie ĉio estis desupre planita kaj oni ne atendas de instruisto grandan kreaĵon inventemon
- posedas sekan formon de sciencismo
- ne estas esenco de la vivo
- instruado ne atentis pri individueco de la infano
- praktikado de ekposedo de la infano en la nomo de ĝia „bono” kaj senigo de ĝia individueco, emo altrudi al la infano la mondon de plenkreskuloj kaj ties bezonoj
- troa fido al libroj – kiel vojo al supraĵa alproprigado de ideoj, senigita de sendependa pensado kaj supera volo

### **Specifeco de eduka procezo laŭ Tagore**

1. Unuaplane emoci-estetika perceptado kaj intuicia kono antaŭ la scienca kono.
2. Formigo de karaktero kaj de spirita vivo kaj sekve de tio estingo de viv-turmento; ekkonado de si, lernado de sinmoderigo, rego super avidemo koncerne riĉaĵojn kaj komuna sinteno, estimo de la bezono de esprimado ĉe la infano.

3. Malkovro de la harmonio inter vero kaj belo; edukado pere de vero kaj por vero absoluta.
4. Edukado devas kreski el naturaj kulturaj fundamentoj de la socio kaj direktiĝi al valoroj unuigantaj la baratan kulturon. Etika plano - konstruo de morala karaktero pere de aktiveco favoranta hejmecon kaj kunmastrumadon de la lernejo.
5. Disvastigo de am-idealo - supera morala valoro favoras al pli profunda senpera rigardo en la esencon de la homa naturo, pere de amo la homo multobligas sin mem (apogo je modeloj de malfermo kaj simpleco).
6. Venkado per memlimigo, memperfektigado kaj scio pri supervenke de malfacilaĵoj pri ekkonado de vero pere de rezigno kaj natura inspirado el la vivoĝojo.
7. Instruo de humileco - protektas kontraŭ agresa interpretado de supozoj pri tio, kio estas bona kaj kontraŭ unuflanka identigo de krea laboro kun sukceso.
8. Virteco de la vivo - akcentado de enhavo kaj formoj, kiuj povas favori disvolvon de konscia kultura identeco kaj scipovon de la krea kaj memstara solvado de sociaj problemoj.
9. Preno de ĝojo el instruado - kiel esprimo de spertado pri propra spirita vivo kaj kompreno, ke ekzistas harmonio inter ilia spirita vivo, vero kaj belo kaj la spirita vivo de aliaj personoj.
10. Specifeco de la medio, en kiu devus okazi instruado - neŭtrala sfero, en proksima kontakto kun la naturo, malproksime de setlejoj kaj de ne dezirataj eksteraj influoj perturbantaj kvieton de la lernantoj.
11. Konsidero de diverseco de spertoj - de komunumo kaj soleco, aktivado kaj kontemplo (lernado pri memregado).

*Kie sentimas mensoj, kaj kapoj alte staras,  
liberas la ideoj; kie la domaj muroj  
sur nia ter' komuna ja ne perverse faras  
ekzercon de disigaj, stretaj arkitekturoj;  
kie el koroj vervaj entuziasme plumas  
spontanaj vortoj; kie senbare kaj elane  
agantoj ĉiuloke, inunde, ekplenumas  
atingojn plej diversajn laŭfonte kaj laŭplane;  
kie mortinta sablo de sek' praktikimara*



*ne bremsis la pluiron de viva scivolemo,  
agemon ne sapeis; kie la pensa, fara,  
celebra vojaĝado pluas per Via remo –  
nian Baraton tuje, per plej kruela bato,  
ho Patro, volu vekti al tiu ĉiela stato.*

*Rabindranath TAGORE*

(El la bengallingva originalo la tekston tradukis por IPR Probal DASGUPTA, membro de la Scienca Komitato)

## **Vojaĝo al Slovenio danke al Esperanto (4-8 marto 2019)**

*de Emmanuel DESBRIÈRES (Francio)*

**43 gelernantoj (15-17jaraj) de la gimnazio Victor CONSIDERANT de SALINS-LES-BAINS (Francio) malkovris alian landon danke al Esperanto.**

Kiel tiu aventuro eblis?

Vera defio estis, kiu estis planita de kelkaj jaroj.

Sed komence jen la komenco.

Dum la somero 2016 mi kontaktis Peter GREBC en Slovenio. Chuck SMITH konsilis kontakti lin. Fakte mi petis francan version de DUOLINGO, por ke miaj gelernantoj povu lerni memstare Esperanton. Peter estis konata, ĉar li uzas la anglan version: tiel liaj gelernantoj iras de la slovena al Esperanto tra la angla, ili lernas ambaŭ lingvojn samtempe!

Ni rete amikiĝis. Peter kaj mi estas plie kaj unue instruistoj pri geografio.

Ni organizis du rendezuojn per „skajpo” inter niaj gelernantoj de Esperanto en 2017 kaj 2018. Fakte estis la unuaj „skajpaj” babiladoj de mia gimnazio, kaj ĝi okazis en Esperanto! Partoprenis en Salins la estraro de la gimnazio, pluraj instruistoj, la bibliotekistino, gelernantoj de la Esperanto-ateliero, kiuj parolis kun la gelernantoj de Peter, kaj la gajnantoj de konkurso, kiun ni organizis por malkovri Slovenion. Inter la gajnantoj estis lernantoj kaj kuiristoj de nia lerneja restoracio... Jen la unua paŝo.

La lerneja jaro 2018-19 malbone komenciĝis. Fakte la eksaj anoj de la Esperanto-grupo ne plu havas disponeblan horon kun mi. Dum pluraj

semajnoj ne plu estis grupo. Kaj venis surprizo. La delegitoj de mia klaso havis projekton: organizi eksterlandan vojaĝon. Mi proponis al ili: viziti la Esperanto-parolantajn korespondantojn en Slovenio. La tuta klaso decidis iri, kaj kune serĉis informojn kaj konstruis programon. Ni estis meze de oktobro...



La sekvo estis vigla: urĝe trovi vojaĝ-entreprenon, obteni permeson de la administra konsilio de la gimnazio, kaj ĉefe trovi mon-rimedojn.

Tiucele ni vendis krespojn kaj artaĵojn (memfaritajn de la lernantoj) en pluraj julbazaroj en la najbaraj urboj. Sed ne sufiĉis. Por malkreskigi la vojaĝ-koston de ĉiu, oni invitis aliajn lernantojn ariĝi kun ni... Estis du kondiĉoj por partopreni, krom pagi la unuan ĉekon kompreneble: helpi por trovi monon, lerni iom da Esperanto (5 horoj).

Tiel ili organizis krespa-teatraĵan posttagmezon kun nia nova partnero *Maison de Salins - Crédit Agricole* (kiu pruntedonis senpage siajn modernajn ĉambrojn). Tiu establo, nuntempe mondskala banko, estis kreita en Salins-les-Bains en 1885... iomete antaŭ Esperanto 😊

La junuloj memgajnis pli ol 2 400 €. Ni ricevis subvencion de asocio de la malnovaj lernantoj kaj finfine pago de ĉiu familio estis nur 250 €. Neniam en nia gimnazio la gelernantoj tiom mem-financis. Tio montras grandan motivadon.

La dua parto de la aventuro estis la vojaĝo mem... Mi ne rakontos ĉion ... Jen la Esperanta parto:

Ni enbusiĝis lundon, la 4-an de marto, vespere, kaj mardon frumatene ni matenmanĝis en Koper ĉe Adriatiko en la lernejo de Peter: *Osnovna šola Antona Ukmarja*, elementa kaj meza lernejo.

Poste ni estis oficiale akceptitaj de sinjorinoj DOLINŠEK, estrino, kaj STRMČIK, instruisto pri la franca lingvo. Peter prezentis Slovenion per bildoj en Esperanto... Mi tradukis. La francoj demandis multon.

4 francaj lernantoj kaj mi estis intervjuitaj de ĵurnalistino de Radio-Koper per Esperanto kaj poste lernis Esperanton kun la slovenaj lernantoj... per *Duolingo*, dum la plejparto de nia grupo vizitis la slovenan lernejon kaj ĉeestis kursojn en la slovena!

La ceteraĵoj de nia mallonga restado en Slovenio konsistis el vizito al la ĉefurbo, Ljubljana, kaj vizito al salejo, gigantaj grotoj, kastelo en groto ktp...

**Bano de lingvoj**, almenaŭ 5: Esperanta, slovena, franca, angla kaj itala (Koper estas proksime de Triesto, kaj la itala estas vaste parolata tie).

Kio okazos estontece?

Ni ne scias. Ni esperas, ke la slovenoj vizitos nin. Ni pripensas alian vojaĝon danke al Esperanto. Nia aventuro interesas la estraron de nia regiona lerneja oficejo pri internaciaj rilatoj... Artikolo aperis pri nia sperto en la retejo de tiu oficejo. Ni pli kaj pli laboras kun partneroj, eĉ la urbestraro.

Do ni vidos. La plej grava aspekto estas, ke la iniciato venas de la gelernantoj.

Pri Esperanto? Ili ne regas la lingvon... sed danke al ĝi ili vojaĝis... Eble kelkaj lernos pli ... Ni vidos.

## Leterkesto

*Tre estimataj gekolegoj,*

Evidentiĝas ke nun ekzistas centoj da instrulibrooj, do por ĉiuj deziroj, tiel ke estas sufiĉe malfacile elekti. Pro tio ni ne povas diri certe, ke tiu aŭ alia instrulibro estas la plej bona...

Laŭ mia opinio la plej gravan rolon havas la instruisto, ĉar nur li/ŝi povas decidi kiu libro plej taŭgas por liaj gelernantoj, ĉar tio dependas de la aĝo de la gelernantoj, de ilia studkapablo, de la lokaj kondiĉoj kaj de aliaj faktoroj. Mi mem por instrui al la 5-aj kaj 6-aj klasanoj uzis sukcese la libron *Ludu kun ni 1-2*, sed ankaŭ la instrumaterialojn de Stano MARĈEK kaj la *Tendaraj tagoj* por la pli aĝaj. Al etuloj mi instruis E-on laŭ la tre interesa libreto

*Esperanto por infanoj*, de G. Gladstone SOLOMON. Kompreneble mi uzis kaj adaptis multajn aliajn instrumaterialojn laŭ cirkonstancoj...

Konklude mi dirus, ke la elekto de la, ni diru, plej bona instrulibro dependas de ni mem, do bone ke ili ekzistas kaj la instruistoj havas de kie elekti... Por kompari la situacion mi memoras, ke dum la komunisma reĝimo en mia lando sur la bretoj de la nutraĵvendejoj troviĝis nur kelkaj specoj de varoj, tiel ke por aĉetanto estis tre facile elekti sen perdi multe da tempo, sed hodiaŭ en superbazaro ekzistas tiom da specoj de varoj, ke la aĉetanto sentas sin kiel en ĝangalo, do li preskaŭ perdiĝas kaj krome li perdas multe da tempo por decidi kiujn varojn li deziras.

Sincere mi gratulas ĉiujn aŭtorojn de la instrulibro kaj al ĉiuj instruistoj mi deziras plenan sukceson!

Amike kaj altestime,  
*Mihai TRIFOI (Rumanio)*

## Trukoj por paroligi la progresintojn

***Aktiveco rilate la Unuan Bultenon kaj la aliĝilon por la UK 2019 en Finnlando***

*de Harald SCHMITZ (Germanio)*

La suba teksto kun demandoj kaj taskoj estas por la instruado de progresintoj. Mi uzis ĝin dum intensa semajnfina kurso en Germanio, kiun partoprenis sep plenkreskuloj. La lernantoj bezonas kopiojn de la Unua Bulteno kaj de la apuda aliĝilo, kiuj broŝurforme troviĝis en pasinta numero de la konata UEA-gazeto *Esperanto*. (Ligon al la enskanitaj Bulteno kaj Aliĝilo vi trovos en nia servilo ĉi tie: <http://www.ilei.info/pdf/bulteno2019.pdf>).

La demandaron, kiu foje entenas ankaŭ ŝercajn erojn, kursgvidanto povas utiligi diversmaniere, ekzemple per partnera kunlaboro: la kursanoj provas duope trovi la respondojn, komentojn aŭ siajn opiniojn por pli poste prezenti siajn eltrovaĵojn al la aliaj membroj de la kurso.

Do la partnera laboro, dum kiu ĉiuj prefere nur parolu Esperanton, estas la preparo por buŝa prezentado. Poste oni ne necese pritraktu ĉiujn 25 demandojn/taskojn, sed tiuj pri la propraj opinioj de la kursanoj verŝajne estas la plej interesaj.

La tuta aktiveco daŭras almenaŭ du horojn, depende de la nombro de la priparolataj punktoj kaj eventualaj postaj diskutoj.



## **Demandoj kaj taskoj pri la Universala Kongreso en Finnlando**

Bonvolu trovi la respondojn por la demandoj kaj taskoj en la „Unua Bulteno” de la UK 2019 kaj en la aliĝilo. Vi ne bezonas skribi longajn kaj kompletajn frazojn; mallongaj noticoj sufiĉas por pli poste preparoli aŭ prezenti la solvojn.

1. Kiam ekzakte kaj kie okazos la sekvonta UK? La kioma ĝi estas?
2. Antaŭ ol legi la tutan bultenon: kiujn pensasociojn vi persone havas pri Finnlando?  
Notu kelkajn kapvortojn kaj memorigilojn por la posta prezentado.
3. Kiel enkondukas la aŭtoroj de la bulteno sian landon? Kion ili substrekas?
4. Kion vi ekscias pri la urb(et)o de la UK per la bulteno?
5. Kiuj avantaĝoj, speciale por la partoprenontoj de la UK, estas menciataj?
6. Elektu po du ecojn/trajtojn kulinaraĵajn, tranoktajn kaj kongreseĵajn, kiujn vi ŝatas aŭ opinias gravaj.
7. Kion oni ekscias pri la klimataj kondiĉoj fine de julio?
8. Kio estas „kongresa peranto”? Kio estas lia aŭ ŝia tasko?
9. Ĉu vi konas unu el la homaj perantoj en la listo persone? Kiam vi lin/ŝin renkontis?
10. La germano en la listo estas konata ne nur pro sia pera funkcio. Pro kio alia multaj germanaj esperanto-parolantoj konas lin?
11. Donu vian opinion: ĉu oni skribu 'esperanto-parolanto' aŭ 'Esperanto-parolanto'? Ekzistas ja kialoj por ambaŭ skribmanieroj. Kiuj?
12. Kion vi povus fari por pludoni la aliĝilon al alia interesata persono?
13. Unuavide la du-paĝa aliĝilo estas sufiĉe konfuza – kial?
14. Klarigu la terminojn 'UEA kodo', 'CO', 'Fondaĵo Canuto', 'ĉefaliĝinto', 'Kongresa Libro', BIC.
15. Kelkaj el miaj gimnaziaj lernantoj, kiujn mi ŝerce petis pri mono por ke ili ricevu pli bonajn notojn en matematiko, nomis min „IBAN, la Terura”. Klarigu tiun krom-nomon ☺
16. Kiamaniere oni povas pagi la kotizon?
17. Kalkulu la kongreskotizojn por vi mem, se vi aliĝas la 5-an de aprilo 2019.
18. Kiel la bulteno difinas la vortojn 'kunulo' kaj 'junulo'?
19. Ĉu handikapulo rajtas partopreni senkoste aŭ ĉu li/ŝi almenaŭ ricevas rabaton?
20. Kiuj personoj rajtas aliĝi senpage?
21. Ĉu vi entute trovas la kongresan kotizosistemon justa/praktika?

22. Kial Israelo, Korea Respubliko kaj Japanio ne estas B-landoj?
23. Kion la kongreskotizoj ne kovras?
24. En la lasta paragrafo de paĝo 2 de la Aliĝilo oni parolas pri la „leĝoj de la lando, kie okazas la UK”. Bonvolu doni ekzemplojn por tiaj leĝoj.
25. La bulteno kaj la aliĝilo entenas kongresan simbolon. Utiligu vian fantazion por spekulacii pri la elekto-motivoj de la kreintoj de la simbolo.

## La simpozioj de ILEI

ILEI en sia 70-jara historio organizis diversajn renkontiĝojn kaj eduk-projektojn. En la lastaj jardekoj de la pasinta jarcento kaj komence de ĉi tiu, la regula ĉiujara ĉefevento de ILEI fariĝis Konferenco (ekde 2017 Kongreso) – entute 51 ĝis nun kaj en julio 2019 okazos la 52-a Kongreso de ILEI en Ĉaĉak, Serbio. La konferencoj / kongresoj de ILEI kutime havas sian ĉeftemon el la sfero de interesoj de ILEI kiel akson de la faka programo de la evento.

Por la jaro 2005, la tiama estrarano pri kongresoj kaj pri scienca kaj universitata agado, Aida ĈIZIKAITĒ, proponis organizi simpozion pri la konferenca temo. La ĉeftemo de la 38-a Konferenco de ILEI en Kaunas (Litovio, 2005) estis *Interkultura komunikado en edukado*. Unutaga dum-konferenca ILEI-simpozio renkontigis esperantistajn kaj neesperantistajn universitatanojn, fakulojn pri la temo. Simile okazis en Parmo, 2006, kie la konferenca temo estis *Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj*. Sep prelegantoj prelegis en la lingvoj Esperanto, la itala kaj angla. Kolekto de simpoziaj materialoj el Parma elŝuteblas el la retejo de ILEI<sup>1</sup>.

En 2007 la 40-a Konferenco okazis en Ranzan, Japanio. La temo de la konferenco kaj de la tria ILEI-simpozio estis *Virinoj en Esperanto-kulturo* kiel siaspeca dankesprimio al la japana registara edukcentro por virinoj, kiu gastigis la konferencon. Ĉefprelegis Spomenka ŜTIMEC, oni diskutis pri seksismo en Esperanto, konatiĝis kun la vivo kaj agado de *Verda Majo* kaj tuŝis diversajn aspektojn de la ĉeftemo.

La kvara simpozio estis planita por Portonovo (Benino, 2008, temo: *Instruistoj de Esperanto por la planedo Tero*), la simpozia alvoko estis vaste diskomunikita, tamen malmultaj prelegantoj anoncis sin. Elstaris la prelego de François LO JACOMO: Ĉu esperantistoj defendu edukadon per la gepatra lingvo? Multe pli da prelegantoj (24 el 16 polaj kaj alilandaj universitatoj kaj

altlernejoj) havis la kvina ILEI-simpozio en Krakovo (Pollando, 2009, temo: *La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado*). Kajero de simpoziaj traktaĵoj elŝuteblas el la kongresa paĝo<sup>1</sup> de la ILEI-retejo.

En la lastaj 14 jaroj, nur la 43-a (Matanzas, Kubo, 2010) kaj 46-a (Herzberg – Sieber, Germanio, 2013) konferencoj kaj la 50-a kongreso de ILEI (Busan, Koreio, 2017) okazis sen simpozio. Tamen, en la jaro 2017 ILEI organizis universitatan simpozion aliloke kaj en alia semajno.

Ĉeftemo de la 44-a ILEI-konferenco en Kopenhago, 2011, estis *Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado*, kaj la dutaga dumkonferenca simpozio, la sesa en la vico, enfokusigis pli specifan aspekton de la temo, vortigitan: *Lingvoj de scienca komunikado kaj edukado*. Ĝi aŭdigis prelegojn kaj diskutojn de pintaj lingvistoj kal kulturologoj de Nordio (Frans GREGERSEN, Robert PHILLIPSON, Karsten FLEDELIUS) kaj Esperantujo (Humphrey TONKIN, Detlev BLANKE, Sabine FIEDLER, Probal DASGUPTA k.c.) kaj dialogigis ilin pri Esperanto kiel la plej sukcesinta planlingvo. La simpozia programo kaj ligiloj al prelegresumoj troveblas en la simpozia retpaĝo<sup>2</sup> de la ILEI-retejo.

La sepan ILEI-simpozion (Kunming, Ĉinio, 2012) organizis kunlabore la Ĉina sekcio de ILEI kaj la Profesia Artkolegio de Kunming, kiu gastigis la 45-an Konferenco de ILEI. La temo estis *La arto de komunikado, komunikado de artoj*. La simpozio havis subtenon de la Kolegio de Supera Edukado de la Universitato de Junano (la ĉina provinco Yunnan) kaj Komitato de Supera Edukado de la Junana Asocio de Privata Edukado. Prelegis 5 ĉinlingvanoj kaj 5 esperantistoj el Ĉinio, Aŭstralio, Svislando kaj Usono. La programo kaj prelegresumoj elŝuteblas el la retpaĝo<sup>3</sup> de tiu simpozio.

La 47-a Konferenco de ILEI (Montevideo, Urugvajo, 2014) havis pompan inaŭguron en la Parlamenta Palaco (inter lokaj esperantistoj populara kiel Leĝa Palaco – laŭvorta traduko de la hispanlingva nomo), kie Unesko aprobis la faman unuan rezolucion favore al Esperanto en la jaro 1954, sed la 8-a simpozio apenaŭ okazis pri la ĉeftemo *Lingva justeco en praktiko: latinamerikaj spertoj*. Savis ĝin Mark FETTES kaj Duncan CHARTERS per siaj elstaraj prelegoj.

En Oostende (Belgio, 2015) la ĉeftemo de la 48-a ILEI-konferenco estis *Grandan pacon post grandaj militoj* kaj la 9-a ILEI-simpozio<sup>4</sup> okupiĝis pri *Lingva justeco kaj paco - Kiuj defioj por la nuna mondo*. Jaron poste en

Nyíregyháza, Hungario, la 10-a ILEI-simpozia temo estis *Novaj vojoj de lernado*<sup>5</sup>.

La 11-a universitata simpozio organizita de ILEI en la jaro 2017 okazis space kaj tempe ekster la tiujara 50-a ILEI-kongreso en Busano. Ĝi okazis semajnon poste en Seulo, ĉe HANKUK-Universitato de Fremdaj Studoj HUFU, pri la temo *Nuna stato kaj evoluo de la instruado de Esperanto kiel internacia lingvo en la tuta mondo*<sup>6</sup>. Dum la 51-a Kongreso de ILEI en Madrido, 2018. ILEI, Hispana Esperanto-Federacio kaj Madrida Esperanto-Liceo, kunlabore kun la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED), organizis la 11-an ILEI-simpozion<sup>7</sup> pri *La kultura heredaĵo de Esperanto*.

La 13-a ILEI-simpozia evento (Ĉaĉak, Serbio, 18-19 julio 2019) portos la nomon Internacia Scienca Konferenco pri ***Lernado en virtualaj komunumoj***. Ĝi okazos kadre de la 52-a Kongreso de ILEI (13-20 julio) kaj estas organizata kunlabore kun la Fakultato de Teknikaj Sciencoj en Ĉaĉak, kiu apartenas al la Universitato de Kragujevac. Tiel daŭradas la tradicio de malfermiteco de ILEI-simpozioj al institucioj kaj esploristoj neesperantistaj. Tio malfermas pordojn por disvastigado de Esperanto en sciencaj kaj universitataj rondoj.

Vi estas bonvenaj jam sendi al [ilei.kongresoj@gmail.com](mailto:ilei.kongresoj@gmail.com) viajn prelegproponojn por Ĉaĉak pri jenaj, sed ne nur tiuj subtemoj de la ĉeftemo *Lernado en virtualaj komunumoj*:

- *Lernkomunumoj en virtuala medio*
- *Lingvolernado en virtualaj komunumoj*
- *Virtualaj komunumoj de indiĝenaj lingvoj*
- *Indiĝenaj komunumoj en virtuala medio*
- *Esperanto-movado kiel virtuala komunumo*
- *Virtualaj kursejoj de Esperanto*
- *Adaptiĝemaj lernteknologioj*
- *Sociaj retoj kaj lernkomunumoj*
- *Retserĉado en virtualaj komunumoj*
- *Scikreado en retaj lernkomunumoj*
- *Lernmodeloj en virtuala medio*
- *Komunikteknologia kulturo*

Radojica PETROVIĆ

<sup>1</sup> <http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php>

<sup>2</sup> [http://www.ilei.info/konferenco/2011/simpozio\\_programo.php](http://www.ilei.info/konferenco/2011/simpozio_programo.php)

<sup>3</sup> <http://www.ilei.info/konferenco/2012/simpozio2012.php>

<sup>4</sup> [www.ilei.info/konferenco/2015/SimpozioOostende2015.pdf](http://www.ilei.info/konferenco/2015/SimpozioOostende2015.pdf)

<sup>5</sup> [www.ilei.info/konferenco/2016/Simpozia\\_alvoko\\_2016.pdf](http://www.ilei.info/konferenco/2016/Simpozia_alvoko_2016.pdf)

<sup>6</sup> [www.ilei.info/konferenco/2017/simpozio\\_Busano.pdf](http://www.ilei.info/konferenco/2017/simpozio_Busano.pdf)

<sup>7</sup> <http://www.ilei.info/konferenco/2018/simpozio2018.php>

# Kongresoj de ILEI en venontaj jaroj

## La 53-a Kongreso, 2020

La 53-a Kongreso de ILEI okazos en Kebekurbo, Kanado, inter la 25-a de julio kaj 1-a de aŭg. 2020, en la Universitato Laval (<https://www.ulaval.ca/>), en la semajno antaŭ la tiujara UK en Montrealo.

Kebekurbo, ĉefurbo de la provinco Kebekio de Kanado, koro de la franckanada kulturo (legu: kebeko kulturo, kiel la kebekanoj preferas), enskribita en la liston „Monda heredaĵo” de Unesko, la unua eŭropana urbo en Nordameriko (1608), la nura fortikigita urbo norde de Meksiko, kun ankoraŭ ekzistantaj muroj, proponas abundon da turismaj kaj kulturaj logaĵoj. La universitata kampuso de Laval disponigas sufiĉajn spacojn por la diversa ILEI-kongresa programo kaj komfortajn moderkostajn ĉambrojn por loĝado. Estas facile veturi inter Montrealo kaj Kebekurbo, trajne aŭ buse. Por eŭropanoj, ekzistas ankaŭ rektaj flugoj al la kebekurba flughaveno. Dum la kongreso en Ĉaĉak eblos aliĝi kaj rezervi loĝadon por la kongreso en Kebekurbo kun speciale rabatitaj kotizoj por frualiĝantoj.

## Konkurso por la kongresoj 2021 kaj 2022

Konforme al Konferenca (Kongresa) Regularo ([http://www.ilei.info/dok/Konferenca\\_reguloro.pdf](http://www.ilei.info/dok/Konferenca_reguloro.pdf)), la Estraro de ILEI invitas sekciojn de ILEI, aŭ aliajn Esperanto-organizojn kunlabore kun la ILEI-sekcio, aŭ memstare se en la lando ne ekzistas sekcio de ILEI, kandidatiĝi por:

- invitanto de la 54-a Kongreso de ILEI planata por la jaro 2021
- invitanto de la 55-a Kongreso de ILEI planata por la jaro 2022.

## Kiel konkursi?

Necesas sendi kandidatiĝan leteron retroŝte al [ilei.kongresoj@gmail.com](mailto:ilei.kongresoj@gmail.com), kopie al [ilei.sekretario@gmail.com](mailto:ilei.sekretario@gmail.com). Limdato: la 15-a de julio 2019.

Bonvolu precizigi ĉu vi kandidatiĝas por la jaro 2021 aŭ 2022 kaj aldoni:

- Deklaron, ke vi akceptas la Konferencan Regularon de ILEI ([http://www.ilei.info/dok/Konferenca\\_reguloro.pdf](http://www.ilei.info/dok/Konferenca_reguloro.pdf)),
- Bazajn informojn laŭ la jena demando:

1. Konciza prezento de la organizaĵo/ILEI-sekcio, kiu kandidatiĝas por inviti la kongreson, ĝiaj organiza strukturo, adres- kaj kontakt-informoj, agadplanoj, agadrezultoj kaj motivoj por inviti la kongreson.
2. Ĉu iam antaŭe okazis iu ILEI-aranĝo en via lando? Se jes, kiu, kie kaj kiam?
3. Prezento de ebla LKK: prezidanto, kasisto kaj aliaj taskplenumontoj, kaj ilia ĝisnuna partopreno en ILEI-eventoj.
4. Kion vi proponas por la kongresejo, kiomkoste (proksimume) kaj kun kiaj kondiĉoj kaj teknikaĵoj? Kiel ĝi povas plenumi la bezonojn de kongresa programo laŭ la programskemo ([www.ilei.info/konferenco/programskemo.pdf](http://www.ilei.info/konferenco/programskemo.pdf)).
5. Kiujn datojn vi proponas por la kongreso kaj kiel ĝi rilatus al aliaj E-eventoj atendeblaj en tempa aŭ geografia proksimeco de la ILEI-kongreso, precipe al UK?
6. Kian kaj kiomkoston (proksimume) loĝadon vi povos proponi al la kongresanoj?
7. Kiaj estas la veturebloj por alveno kaj foriro de la kongresanoj?
8. Kion, skize, vi proponas por la turisma kaj kultura programo de la Kongreso konforme al la kongresa programskemo ([www.ilei.info/konferenco/programskemo.pdf](http://www.ilei.info/konferenco/programskemo.pdf))?
9. Ĉu vi povas proponi antaŭkongresan aŭ postkongresan turisman kaj/aŭ fakan programon por kongresanoj, kiuj dezirus viziti vian landon pli longe ol la kongressemajnon?

*Radojica PETROVIĆ, estrarano pri kongresoj*

## 52-a Kongreso de ILEI 13-20 julio 2019, Ĉaĉak, Serbio

### Aliĝintoj

La 16-an de aprilo estis 53 aliĝintoj el 21 landoj de Afriko (1), ambaŭ Amerikoj (4 aliĝintoj el 2 landoj), Azio (18 el 5) kaj Eŭropo (30 el 13), plej multaj el Koreio (13), Serbio (8), Rumanio (6) kaj Francio (5). Vi povas vidi la liston de ĝisnunaj aliĝintoj kun la kongresnumeroj en: <http://www.ilei.info/agado/Cacak2019.php>.



## Transporto

*Pri alvenoj:* Plej multaj kongresanoj alflugos al la Flughaveno „Nikola Tesla” Beograd kaj nun venos bazaj informoj por ili. Se vi planas atingi Serbion alimaniere / aliloke, bonvolu laŭbezone skribi al LKK ([ilei.kongresoj@gmail.com](mailto:ilei.kongresoj@gmail.com)) por ricevi konsilon. Por tiuj, kiuj atingos Beogradon kelkajn tagojn pli frue por iom antaŭkongresi en la ĉefurbo, kion ni varme rekomendas, skribu al LKK por ricevi informojn pri organizo de la grupo kaj la programo, se vi ne jam ricevis alivoje.

Se vi volos tuj post alflugo en Beogradan flughavenon daŭrigi al Ĉaĉak, tuj post eliro el la flughavena konstruaĵo, iom maldekstre, atendos aŭ estos baldaŭ venonta flughavena buso A, trafikanta je ĉiuj 20 minutoj (nokte tamen malpli ofte) ĝis la bus-ĉefstacidomo kaj plu ĝis la Placo Slavija. Pageblas nur per dinaraj monbiletoj kaj moneroj, kiujn vi povos havigi ĉe monŝanĝejoj, aŭtomataj kaj giĉetaj, post trapaso de la pasporta kontrolo. Eliru ĉe la dua haltejo: busstacidomo (serbe: *autobuska stanica*), respektive tuj post transiro de la ponto super la rivero Sava, iru en la giĉethalon kaj ĉe ajna giĉeto aĉetu bileton ĝis Ĉaĉak (proks. 10 EUR, pageble nur dinare, eventuale bankkarte). La busoj al Ĉaĉak trafikas pli-malpli ĉiuhore dumtage, sed ne nokte. Post ne pli ol trihora busveturo, la kongresejo (serbe: *Fakultet tehniĉkih nauka*, adreso: *Svetog Save 65*) atingeblas piede el la busstacidomo en Ĉaĉak aŭ taksie el proksima taksi-atendejo. Tra retaj komunikkanaloj ni disponigos la mapojn.

LKK organizos pli komfortan kaj ne multe pli koston grupan transporton el la flughaveno rekte ĝis la kongresejo, se kelkaj kongresanoj alvenos proksimtempe kaj volos atendi unuj la aliajn por la komuna veturo. Tial bonvolu komuniki al [ilei.kongresoj@gmail.com](mailto:ilei.kongresoj@gmail.com) viajn alflughorojn laŭeble tuj kiam vi scios ilin. Iom pli komplike kaj iom pli koste estos por noktaj alflugoj, sed ni solvos ankaŭ tion se ni scios sufiĉe frue viajn alvenplanojn.

*Por la foriroj:* Simile kiel ĉe alvenoj, nur kun inversa veturvico, kaj iom aliloka haltejo de la flughavena buso en Beogrado. Bezonontoj ricevos la klarigon surloke, en Ĉaĉak. Same eblos organizi grupveturojn ĝis la flughaveno.

Por postkongresa vojaĝo al UK en Lahtio eblas rezervi flugon per *Air Serbia* la 20-an de julio, kun ekflugo je 06h35 el Beogrado kaj alflugo je 10h10 en Helsinko, troveblan per, ekzemple: <https://booking.airserbia.com/dx/JUDX/#/home>.

LKK organizos malmultekostan transporton el Ĉaĉak ĝis Beogrado je konvena tempo por atingi la flugon. Eblos veturi grupe malfru-nokte la 20-an de julio (do sabaton antaŭmatene), de antaŭ la kongreshotelo en Ĉaĉak ĝis la flughaveno. Aŭ, se vi preferas ripozi en Beogrado la nokton antaŭ la flugo, vi povos veturi grupe vendredon posttagmeze/vespere, ekzemple je 18h00 aŭ post vespermanĝo de antaŭ la kongresejo ĝis hotelo en Beogrado, kiun vi mem rezervos por tiu nokto. La transporton al Beogrado rezervos LKK, sed la hotelon en Beogrado, se vi elektos foriri vendredon vespere, vi povas elekti kaj rezervi mem, ekzemple, per [booking.com](http://booking.com).

## Loĝmendilo

---

Bazajn informojn pri la loĝproponoj kun loĝ- kaj manĝ-prezroj vi trovos ĉi-sube, post la 11-a demando. Se vi povas, prefere uzu la retmendilon:

<https://forms.gle/BdCvQxT9YsxutzcQ9>. Por rezervi servojn (loĝadon kaj/aŭ manĝojn) por la tuta kongresa semajno, respondu la demandon 5. Por rezervi loĝadon kaj manĝojn por nur unu aŭ kelkaj tagoj, priskribu vian memdon sub la demando 6. (\* La asterisko indikas nepre respondendajn demandojn).

### **Retpoŝta aŭ alia kontaktadreso:**

---

#### **1. Kongresnumero\*** \_\_\_\_\_

*Se vi jam aliĝis, vi povas trovi vian kongresnumeron sekvante la ĉi-supre indikitan ligan.*

*Se ne, bonvolu aliĝi per: <https://goo.gl/forms/sRJGKyDb3IxnkOYf2> aŭ [www.ilei.info/konferenco/2019/papera\\_alighilo\\_2019.pdf](http://www.ilei.info/konferenco/2019/papera_alighilo_2019.pdf).*

#### **2. Nomo \*** \_\_\_\_\_

#### **3. Ĉambro \*** (elektu unu, vidu la proponojn ĉi-sube)

- SA.2/1
- SA.2/2
- SB.1/1
- SB.2/1
- SB.2/2
- LA.3/2
- LA.3/3
- LB.4/2
- LB.4/4

#### **4. Kunloĝanto(j):** Kun kiu(j) vi deziras dividi la ĉambbron?

---

#### **5. Por la tuta semajno?**

*Vi povas rezervi servojn por la tuta kongreso (tiam vi ne respondu la demandon 6). Se vi nun rezervos por la tuta semajno kaj poste volos foriri iom antaŭ la fino de la kongreso, vi ricevos repagon surloke kontraŭ ne uzitaj manĝoj kaj ĉambrotago(j). Se vi rezervos loĝadon (L) kun matenmanĝo (MM) kaj eventuale sed ne nepre tagmanĝo (TM) kaj vespermanĝo (VM) por la tuta semajno, vi ricevos senpage la lasttagan matenmanĝon (sabaton, la 20an de julio). Bonvolu elekti unu aŭ plurajn servojn, kiujn vi deziras rezervi por la tuta kongresa semajno. Se vi ne*



deziras rezervi por la tuta semajno, elektu nenion kaj transiru al la demando 6.

- L
- MM
- TM
- VM

**6. Partatempaj mendoj:** Indiku kion por kiuj datoj vi deziras rezervi:

---

**7. Dieto:** Elektu nenion, aŭ unu aŭ plurajn opciojn.

- Nenio speciala
  - Vegana
  - Vegetara
  - Sen gluteno
  - Sen laktozo
  - Sen porkaĵo
  - Io alia (Se mankas indiko de via dieto aŭ manĝprefero.)
- 

**8. Pagenda sumo (EUR) \*** \_\_\_\_\_

**9. Pagmaniero: \*** (Vi trovos klarigojn de la pagmanieroj ĉi-sube, en la ĉapitro pri loĝproponoj)

- Tra ING-banko
- Tra UEA
- Al LKK

**10. Interkona frandvespero**

*Kiujn gastronomiajn specialaĵojn el via regiono / lando / kulturo vi kunportos kaj proponos dum la interkona frandvespero sabaton, la 13an de julio?*

---

**11. Komentoj:** Se vi havas demandojn, proponojn aŭ ajnajn komentojn, tajpu ilin ĉi tie.

---

Bonvolu kontroli vian mendilon. Se ĉio ĝustas, subskribu ĝin kaj sendu al unu el la ĉi-sube indikitaj adresoj de LKK, ĉu papere ĉu retroŝte. Dankon.

**Loko, dato**

**Aliĝinto – mendanto**

## Loĝproponoj kun prezoj<sup>1</sup>

### Studenthejmo (S)

Ĉambroj en la novkonstruita alo (SA) havas privatajn duŝambrojn kaj necesejojn. En la malnova parto (SB) estas komunaj (etaĝaj) duŝejoj kaj necesejoj. La studenthejmo disponas unulitajn (SA.1/1, SB.1/1) kaj dulitajn ĉambrojn. La dulitaj ĉambroj uzeblas por unu persono (SA.2/1, SB.2/1) aŭ por du personoj (SA.2/2, SB.2/2).

### Domo por mezlernejanoj (L)

La domo por mezlernejanoj disponas du konstruaĵojn: la novan tuj apud la kongresejo, uzatan ekde la pasinta jaro, kaj la malnovan je 15-minuta promen-distanco de la kongresejo. La novaj ĉambroj (LA) estas trilitaj, ĉiu ĉambro havas proprajn enirĉambrojn, duŝejon kaj necesejon, kaj estas uzeblaj kiel dupersonaj (LA.3/2) aŭ tripersonaj (LA.3/3). La malnovaj (LB) estas kvarlitaj, kun komunaj (etaĝaj) duŝejoj kaj necesejoj, kaj uzeblas kiel dupersonaj (LB.4/2) aŭ kvarpersonoj (LB.4/4).

### Loĝprezoj por unu persono / unu nokto

SA - studentaj ĉambroj kun privataj duŝejoj kaj necesejoj

SA.1/1	Unulita ĉambro ( <i>elĉerpita</i> )	€ 16
SA.2/1	Dulita ĉambro por unu persono	€ 18
SA.2/2	Dulita ĉambro por du personoj	€ 12

SB - studentaj ĉambroj kun komunaj duŝejoj kaj necesejoj

SB.1/1	Unulita ĉambro	€ 11
SB.2/1	Dulita ĉambro por unu persono	€ 12
SB.2/2	Dulita ĉambro por du personoj	€ 9

LA - lernejanaj ĉambroj kun privataj duŝejoj kaj necesejoj

LA.3/2	Dupersona ĉambro	€ 17
LA.3/3	Tripersona ĉambro	€ 12

LB - lernejanaj ĉambroj kun komunaj duŝejoj kaj necesejoj

LA.4/2	Dupersona ĉambro	€ 14
LA.4/4	Kvarpersona ĉambro	€ 9

<sup>1</sup> Laŭ la malnovaj landokategorioj de UEA (vidu: A- kaj B-landoj)

## Manĝoj

La studenta kaj lernejana restoracioj proponas la tri manĝojn kontraŭ moderaj prezoj: MM (matenmanĝo): € 2, TM (tagmanĝo): € 4, VM (vespermanĝo): € 3.

### Unutagaj prezoj por unu persono (EUR)

L - nur loĝado, MM - matenmanĝo, TM - tagmanĝo, VM - vespermanĝo

Ĉambro	L	L+MM	L+MM+TM	L+MM+VM	L+MM+TM+VM
SA.1/1*	16	18	22	21	25
SA.2/1	18	20	24	23	27
SA.2/2	12	14	18	17	21
SB.1/1	11	13	17	16	20
SB.2/1	12	14	18	17	21
SB.2/2	9	11	15	14	18
LA.3/2	17	19	23	22	26
LA.3/3	12	14	18	17	21
LA.4/2	14	16	20	19	23
LA.4/4	9	11	15	14	18

\* *Elĉerpita*

**Tutsemajnaj prezoj por unu persono (EUR):** ekde MM dimanĉon, la 14-an de julio ĝis MM sabaton, la 20-an de julio (Se vi rezervas la tutsemajnan loĝadon kun MM (plus eventuale aliaj manĝoj), vi ricevos senpage la lasttagan matenmanĝon.)

L - nur loĝado, MM - matenmanĝo, TM - tagmanĝo, VM - vespermanĝo

Ĉambro	L	L+MM	L+MM+TM	L+MM+VM	L+MM+TM+VM
SA.1/1*	112	124	148	142	166
SA.2/1	126	138	162	156	180
SA.2/2	84	96	120	114	138
SB.1/1	77	89	113	107	131

SB.2/1	84	96	120	114	138
SB.2/2	63	75	99	93	117
LA.3/2	119	131	155	149	173
LA.3/3	84	96	120	114	138
LA.4/2	98	110	134	128	152
LA.4/4	63	75	99	93	117

\* *Elĉerpita*

**Se pro ekskurso vi ne povos uzi iun el rezervitaj kaj antaŭpagitaj manĝoj, vi ricevos la repagon surloke.** Bonvolu anonci tion du tagojn antaŭe.

### **Pagmanieroj**

(1) Tra ING-banko: Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A, kun indiko: „ILEI-Kongreso 2018”. Aldonu 5 € se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.

(2) Tra UEA: Al ILEI-konto ilek-a ĉe UEA, indikante „ILEI-Kongreso 2018”.

(3) Al LKK: Validas nur por aliĝantoj el Serbio. Bonvolu peti [ilei.kongresoj@gmail.com](mailto:ilei.kongresoj@gmail.com) pri detaloj.

### **KONTAKTO**

1. Eblas kontakti la organizantojn (LKK) per la adreso *ilei.kongresoj@gmail.com*, poŝta adreso: Radojica Petrović, - ILEI-kongreso 2019 - *Bul. Oslobodjenja 36, RS-3200 Ĉaĉak, Serbio*
2. Pri financaj aferoj bonvolu kontakti la kasiston de ILEI per la adreso *ilei.kasisto@gmail.com*.
3. Kongresa retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info/agado/Cacak2019.php>
4. FB-grupo ILEI-Kongresoj: <https://www.facebook.com/groups/ILEI.Kongresoj/>

### **Turisma programo**

Proponojn kun prezoj kaj mendilon por ekskursoj kaj bankedo vi ricevos alivoje,

*LKK*

## **INFORMOJ PRI ILEI**

### **Laborkomisionoj**

**Ekzamena:** Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónica Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

**Elekta:** Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

**Kontrolo:** Simon Smits, Orlando Raola.

**Lerneja:** Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

**Regulara:** Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

**Terminara:** Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

**Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Radojica Petrović, Kristin Tytgat, Vicente Manzano Arrondo. Estrare: Ivan Colling.

---

### Enmovadaj partneroj (entute 14)

---

**E@I** (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, [info@ikso.net](mailto:info@ikso.net). Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

**Fondaĵo edukado.net** - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net).

**ICH** (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, [zsafia.korody@esperanto.de](mailto:zsafia.korody@esperanto.de).

**IFEF** (Internacia Fervojistista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

**TEJO** (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**.

Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

**UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, [www.uea.org](http://www.uea.org). Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

*kaj aliaj*

---

### Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

---

**ALTE** (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

**FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

**UN** (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysteester Miro**.

**Unesko** (kun statuso de observanto): Repr. de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, [monique.arnaud@aliceadsl.fr](mailto:monique.arnaud@aliceadsl.fr), **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire, Marie-Sylvie Julian, Emmanuel Desbrières**.

*kaj aliaj*

---

### Membreco kaj pagado por diversaj servoj

---

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), 10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas

**paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko*. Tio kostas por A-landanoj 32 EUR kaj por B-landanoj 18 EUR.** Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna Amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <[ilei.kasisto@gmail.com](mailto:ilei.kasisto@gmail.com)>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

\* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

\* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

\* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

## REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com), [www.ilei.info/ipr/](http://www.ilei.info/ipr/); tel: (+36-70) 931-0530.

Nova peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) kiu zorgos pri vidhandikapitaj membroj de ILEI kaj abonantoj de la tekstaj versioj IPR kaj JA, estas Vjaĉeslav Suslov, rete: [gloro59@yandex.ru](mailto:gloro59@yandex.ru). La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, [moerbeekr@gmail.com](mailto:moerbeekr@gmail.com).

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aprilo 2019,  
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aŭgusto 2019.**



*Mireille Grosjean (prezidanto de ILEI) kaj Karine Arakeljan (prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono) subskribas diplomojn por togolandanoj, kiuj sukcesis en la UEA/ILEI ekzamenoj en 2018*



*Simpozio en Seulo (vd. artikolon de R. Petrović pri simpozioj sur p. 26)*



